



# PENSEO

*N-ro 309*

*jul. / 2017*

Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 28-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

## Anteo (Ĉinujo)



### placebo

sentante min soleca inter tro da homoj,  
mi trovis rifuĝejon kun bonzinoj pluraj.  
sen karno, sen ostaro, en neŭtraj aromoj  
saniĝas mi kor-palpe al lipoj mur-muraj.

2013.12.23

### ĝis verdo

staradas mi sola sub arbo  
kaj skanas rigarde printempojn.  
fariĝas jam blanka la barbo;  
dronigas vi min en is-tempojn.  
muza, kunportu al mi kandelon!

2014.04.28

*muza, kunportu al mi kandelon!*

ĉiela ĉevalo flugilas aeron.  
por ĉasi la spurojn mi ĉirkaŭturniĝas  
en ĉelo for de la sunlumo kaj homo.  
pro sombro jam miaj okuloj bruniĝas.



2014.05.19

## *sola senila demenculo*

ŝtona monto plenas de domaro ŝtona.  
mi min perdis en la labirinto homa.  
vento min kondukis ĝis mia vilao,  
do tranoktis mi sur perono betona.

2014.05.19

## *printempo mankas al la vivo*

vintro pli longa ol la granda muro  
lasas serpentojn dormi sen susuro.  
semoj la kapon levas frostotreme.  
ilin somero fajra tretas preme.

2014.04.28

## Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



### Kunteksto

Eksteras sieĝo  
de vortoj malplenaj,  
freneze ĵetitaj  
ĉe sinon de l' tede.

Malfirmaj, sendirektaj,  
ili treniĝas sur kaos'  
senenhava de l' mondo.

Tamen jen protestas  
silentaj deziroj  
en versoteksado:  
luktas metaforoj;  
poeto saviĝas.

*Juiz de Fora, 10/06/2017*

## Traserçado

Poemo  
 vekas  
 aŭroron  
 kaj ekŝaltas  
 tuj la sunon  
 nur por vidi  
 trembrili rosojn  
 sub ĉielruĝo,  
 kiu pentras  
 la hararon  
 de oldaj arboj.

Ebria  
 de roser'  
 matena,  
 akceptas  
 birdojn  
 la poemo:  
 arojn el paco,  
 kiuj pasas  
 tra la urba ĉielo.

Kaj la poemo  
 ekiras per  
 flugo halucina  
 de kolibro  
 serçanta amon...

Tagmeze  
 eniras la poemo  
 konstruaĵon,  
 kie ripozas  
 la dormo  
 de masonisto.

Kaj do ĝi restas  
 tie kvieta  
 kaŝe kopiante  
 la revon homan  
 de ies koro.

*la 15-an de Junio 2017*

## Magio

Delikateco levita  
 ĉe ĝarden' de tiu domo;  
 fenestroj ĉiam fermitaj:

La rozkolora rozujo,  
 kies petaloj infanaj  
 tre diafanaj kirliĝas  
 per milda valso de Strauss.



*Juiz de Fora, 28/06/2017.*

## Paŭlo Silas (Brazilo)



**KIO ESTAS POEMO?**

Se mi scius kio estas poemo,  
 mi verkus poemon kapablan detrui planedon.  
 Poemoj detruas nur poetojn.  
 Kio estas poemo?  
 Se mi scius, kio estas poemo,  
 mi ne dirus al vi.  
 Ne komencu tian paroladon pri  
 boneco, solidareco aŭ karitato.  
 Mi estas ateisto. Ateistoj ne estas bonaj  
 homoj.  
 Kio estas poemo?  
 Se mi havus respondon, mi patentigus ĝin.

*la 8-an de majo 2017*

# PREVENTA POEMO

Venos epoko kiam homoj ŝparos forton dum  
jardekoj por verki poemon.  
La epoko ankoraŭ aktuala vekas nostalgion en  
mi.  
Venas epoko kaj mi jam palpas ĝian kruron.  
Vojmontriloj ne montros vojojn.  
Ili donos konsilojn pri poetiko.  
Poemserĉantoj fosos ruinaĵojn por trovi  
nekonatan poemon.  
Homoj studos la tutan vivon por lerni kiel  
verki vivpoemon.  
Kiam ili verkos unun, ili mortos pace,  
komfortaj kun la scio,  
ke ili riĉigis la mondon per nova poemo.  
Ĉu mi amu tiun epokon?  
Aliaj bedaŭrinde ne havos la saman  
bonŝancon  
kaj dronos en malĝojo kaj elreviĝo.  
La fato de la homa raso estas privilegio plus  
privilegio.  
Iuj kvartaloj, malproksimaj de la urbocentroj,  
koncentros la plej grandan proporcion de  
danĝeraj rezignantoj,  
la homoj kiuj tute ne plu strebos verki  
poemon.  
Sango lavos la trotuarojn de tiuj kvartaloj.  
Mi abomenas la epokon kiu ankoraŭ ne  
ekzistas.



la 5-an de majo 2017

## Mori (Usono)



# AFORISME(21)

Homoj  
kun sklava pensmaniero  
nek pensas nek sonĝas  
pri libero.

\*\*\*

Homo, kiu povas  
siajn pensojn ŝanĝi,  
Povas sian vivon  
rearanĝi.

\*\*\*

Al homoj  
kiuj ŝtelas  
Vian ĝojon,  
baru la vojon!

\*\*\*

Ju pli malplena  
la kapo,  
despli pompa  
la ĉapo.

\*\*\*

vivo estas pli bela  
sur la tero,  
kiam oni vivas humile,  
sen fiero.

\*\*\*

Tiel diras  
mia saĝo:  
Ne valoras  
vivo en kaĝo.

\*\*\*

Homo kiu jam certas  
pri sia valoro  
traktas aliulojn  
kun respekto  
kaj plej humila koro.

\*\*\*

Ne ekzistas vojo

al ĝojo,  
 ĝojo estas la vojo.  
 \*\*\*  
 Kie stultuloj  
 regas  
 aŭ regantoj  
 stultas  
 socipolitikaj problemoj  
 multas.  
 \*\*\*  
 Dum ĉiu homo zorgas  
 nur pri sia afero  
 mizero kaj maljusto  
 ekzistas sur la tero.  
 \*\*\*  
 La mondo estas  
 via spegulo  
 por vidi bonon  
 estu bonulo.  
 \*\*\*  
 Tiu, kiu provas  
 esti elstarulo  
 sur la ŝultroj de aliuloj  
 similas al malgrandega kulo  
 sur la dorso de muloj.  
 \*\*\*  
 Sen travidi  
 la pasintecon  
 kritike,  
 ne eblas krei  
 la estontecon  
 praktike.  
 \*\*\*  
 Tiu, kiu lomprenas  
 klarigon ne bezonas.  
 \*\*\*  
 Per si mem  
 falus despotoj,  
 se ne ekzistus  
 idiotoj.  
 \*\*\*  
 Ne ĉiu viro  
 estas kavaliro

## Wally Du Temple (Kanado)



Indiĝenaj popoloj 'kantas'  
 kiel kanarioj por la tero

Ĉu vi aŭdis pri kantantaj kanarioj ?  
 Kiujn la ministoj portis en minejojn  
 Averti pri asfiksio de spirasoj  
 Mortigaj se ĝutas spasme en la plumojn?  
 Kiaj strangaj partneroj sed ne volontaj -  
 Kanarioj flavaj, kaj polvaj ministoj  
 Ministro karba, devas li fulge fosi.  
 Kanario kapta volas ĝi forflugi,  
 Libere sori, surfi sur ventondoj  
 Kante ĉerpi, kaj sen kaĝe amdeklari  
 Al amato ien alte super arboj.  
 Ministoj karbaj ne volas sin sufoki  
 Pro laboro pena, borantaj subtere  
 Devigas birdetoj asfiksie morti  
 Por sekure, ili manlaboru lukre.  
 Ĉu vi aŭdis pri kantantaj indiĝenoj?  
 Kiuj manifestacias, vojojn blokas  
 Atentigas la firmaojn pri danĝeroj  
 Provas protekti la naturan medion  
 Devigi indan etikon de teramo?  
 Kiaj strangaj partneroj sed ne volantaj –  
 Firmaoj, ekspluantoj de senviva materio  
 Laŭ nefleksebla homcentriga linea tempo.

Alifonte  
 En Polinezio estis gardantoj de la popolo  
 Kies scio saltis radiksente el la tero  
 Venis de bestoj, akvoj, aeroj, fajroj  
 Sezonoj. La cikloj karambolis onde  
 Inte, ante, onte ondume kiel  
 Supre de surfondoj en Polinezio  
 Tiuj skiis la akvajn akumuliĝojn,  
 Ondumintoj renverse elsuĉinten de la plaĝoj,  
 Skiis per ligno la hulojn sub ŝaŭmrompiĝoj  
 De vortice altiĝantaj ondumontoj ĝis  
 Krestrajde spertis la ĉiaman NUNON.

## PAPOS NASCENTES (Brazilo)



*Krepusko*

ĉu manskribi vin  
 ĉu tajpe klavi vin  
 io agitiĝas io ekbolas min  
 kio vin mi donas tio taŭgas nin  
 silenton krias mi

kiu papili' (ne scias mi)  
 tiom da koloroj  
 ili donis min  
 ĉiu am' ĉiu amor'  
 ĉio jen tabul'  
 desegniĝo via  
 via profil' odor'  
 allogas min ĉi vir-abel'  
 satigas min via miel'  
 mi polenigas vin  
 sigelo ĉelo kor'

ĉu manskribe ĉu klavite  
 mia poem' kor-tuŝu vin  
 eĉ mia entuziasmo  
 sveni venu vin  
 en hebeteca orgasmo  
 klavomiksiĝo freneze mesaĝa  
 verso-stelumadas

via buŝplafon'

## Takashi Ito (Japanujo)



*esto estas malplena ...*

printempo iras ...  
 neniu ja rimarkas  
 formikon unu

nebula luno ...  
 esto estas malplena

tiel murmuri

anĝeloj dancas  
 sur la legenda pino ...  
 serena majo

iranto hejmen  
 sube de korvo sur drat' ...  
 maja kunsento

floras lilio ...  
 kaŝite kaj spirante  
 apud la marĉo



## Ivanichka Madgharova (Bulgario)



Furioza vin'.  
 En bareloj aromoj.  
 Freneza pasi'.



Nuda heliko  
 senhejma en tretiko.  
 Polver' en Kosmo.



Staturon levas  
 oceano. Cunamo.  
 Fajreg' sen fajro.



Arĝentiĝas ni.  
 Rapide vivŝanĝiĝas.  
 La amo etermas.



## Henriko Heine (1797-1856)



# Kie!

Kie la migrul' kun laco,  
kie laste kuŝos mi?  
Ĉu sub palm' en sud' en paco?  
Ĉu ĉe Rejno sub tili'?

Ĉu dezerte min sen ordo  
entombigos fremdular'?  
Ĉu mi kuŝos ĉe la bordo,  
en la sablo do ĉe mar'?

Almenaŭ ja palpebrumos  
ĉie la ĉiel' de Di'.  
Jen mortintolampoj lumos,  
steloj nokte super mi.



\* Tiu ĉi poemo estis trovita en la postlasaĵo de Heine. Ekde 1901 ĝi kiel epitafo de Heine legeblas sur la tombo de Heine en la tombejo Montmartre.

## La plej' belan amproponon....

La plej belan amproponon  
Vi timeme nur ignoras.  
Al demand': "Ĉu pro rifuzo?"  
Vi subite eĉ ekploras.

Mi malofte Vin alpreĝas.  
Dio, helpu ŝin superbe!  
Nun sekigu ŝiajn plorojn  
Kaj lumigu ŝin encerbe.

Tradukis



**Cezar (Germanujo)**

## Zhuangzi (369-286 a.K)



# Zhuangzi

## ĈAPITRO DEKUNUA

# Lasu fari kaj toleru

### §11-05

Vojaĝante al la oriento la generalo Nubo preterpasis la branĉojn de sankta arbo kaj renkontiĝis kun Natura Energio, kiu sin amuzis frapadante al si la femurojn kaj saltadante kiel pasero. Ekvidante lin, la generalo Nubo tuj haltis momenton kaj mire demandis:

"Kiu vi estas, maljuna sinjoro? Kion vi faras ĉi tie?"

"Mi min amuzas!" respondis Natura Energio senĉese frapadante al si la femurojn kaj saltadante kiel pasero.

"Mi volus meti al vi kelkajn demandojn," diris la generalo Nubo.

"Ve!" suspiris Natura Energio, lin rigardante.

"La ĉielo estas en malharmonio kaj la tero estas blokita," diris la generalo Nubo. "La ses naturaj spiroj de la jino, la jango, la vento, la pluvo, la lumo kaj la mallumo estas en malordo, kaj la sinsekvo de la kvar sezonoj de printempo, somero, aŭtuno kaj vintro estas malreguligita. Mi volus harmoniigi la esencon de la ses naturaj spiroj, por ke mi povu nutri ĉiujn estaĵojn en la mondo. Kion do mi faru?"

"Mi ne scias. Mi ne scias!" diris Natura Energio skuante la kapon. Li ĉiam frapadis al si la femurojn kaj saltadis kiel pasero.



La generalo Nubo ricevis de li nenian respondon.

Tri jarojn poste la generalo Nubo refoje vojaĝis al la oriento. Li preterpasis la kampojn de la regno Song kaj hazarde renkontiĝis kun Natura Enerĝio. Tre ĝoja li kuris antaŭen kaj demandis:

“Ĉu vi min forĝesis? Ĉu vi min forĝesis?”  
Li dufoje koŭtoŭis por montri sian sinceran esperon lerni de Natura Enerĝio.

Natura Enerĝio respondis: “Mi min amuzas moviĝante sencele tien kaj tien. Mi libere vagadas observante la veron de la estaĵoj. Kion alian do mi povus scii?”

“Ankaŭ mi libere moviĝas,” diris la generalo Nubo, “sed la popolo min ĉiam sekvas. Mi intimiĝas kun la popolo, ĉar mi ne povas agi alimaniere, kaj tamen la popolo prenas min kiel sian modelon. Mi volus aŭskulti vian konsilon.”

Natura Enerĝio diris: “Kiam la natura evoluo de la estaĵoj estas malordigita kaj la denaska naturo de la estaĵoj estas perturbita, la natura stato de la estaĵoj ne estas plu konservata. Tiam la kvarpieduloj en aroj disiĝas kaj birdoj timiĝite plorkantas dum la nokto. Katastrofoj falas sur la plantojn kaj insektojn. Ho, ĉio ĉi tio estas ŝuldata al la kulpo de tiu, kiu regas super la popolo!”

“Tiukaze, kion do mi faru?” demandis la generalo Nubo.

“Ho, vi ja alportas tro grandan malutilon al la popolo!” respondis Natura Enerĝio. “Tuj revenu al via denaska naturo, libera de ĉiaj mondecaj implikaĵoj!”

“Ja estas por mi tiel malfacile renkontiĝi kun vi. Mi tre volus aŭskulti vorton de vi.”

“Ho! Kulturu vian menson. Jen ĉio!” respondis Natura Enerĝio. “Sekvu la naturan evoluon de la estaĵoj kaj faru nenion, kaj ĉio ŝanĝiĝos per si mem. Vi devos nur ignori vian fizikan formon, liberigi vin de via saĝeco kaj forgesi vin kune kun ĉio en la mondo. Vi devos nur miksi vin kun la esenco de la naturo,

liberigi vin de ĉiaj zorgoj kaj maltrankviloj, kaj fariĝi tiel senanima, kiel morta cindro. Tiukaze ĉio en la mondo retrovos sian komunan radikon sen scii pri ĝi. En nesciado, nenio disiĝos de sia radika fonto dum sia vivo. Se io scias pri sia radika fonto, tio disiĝos de ĝi. Ne demandu pri ĝia nomo, nek penu sciiĝi pri ĝiaj veraj detaloj, ĉar ĉiuj estaĵoj naskiĝas kaj kreskas nature.”

“Vi komprenigis min pri la virto kaj montris al mi la manieron gardi la silenton,” diris la generalo Nubo. “Nun mi finfine lernis tion, kion mi vane serĉis dum mia vivo.”

Li refoje koŭtoŭis kaj, dirinte adiaŭ, ekiris sur la revenvojon.

*Elĉinigi*



**Wang Chongfang**

(Ĉinujo)

**Ĉineske**

**Veĵdo (Ĉinujo)**



**Bonege!**

el la rakontoj pri Afanti  
—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo\*

Afanti

portis ĝojplene  
melonojn al la reĝo,  
kiujn li plantis pene,  
jen surazene.

La reĝo  
kun laŭdo bona  
akceptis ilin ĉiujn  
sed sen pagado mona,  
jes, nenioma!

La reĝo  
trifoje nure  
ride diris, “Bonege!”  
Afanti jen murmure  
foriris kure.

Pro malsat’  
li eniris en  
manĝbutikon por manĝi.  
Bulkojn englutis sen ĝen’  
li kun ridmien’.

Li tamen  
ne pagis tute  
kaj nur diris trifoje  
“Bonege!” senbalbute,  
foriris mute.

La mastro  
flame kolera  
akuzis lin antaŭ l’ reĝ’  
pro la kondukt’ fiera  
kaj malsincera.

Al la reĝ’  
li diris rore,  
“Afanti ja ne pagis  
por manĝaĵo ignore  
jen ĵusa-hore.”

La reĝo  
riproĉis tondre,  
“Afanti, ĉu vi rajtas  
ne pagi vagabonde  
kaj ja senhonte?”

Afanti  
diris mokride,  
“Via moŝt’, mi jam pagis  
per laŭdoj tuj rapide  
kaj senhezite.

Trifojaj

“Bonege!” diris  
mi kiel vi jam faris,  
kiam vi ja trankvilis  
kaj vi foriris

preninte  
melonojn miajn.”  
La reĝ’ ne povis diri,  
frotante manojn siajn  
vortojn aliajn.



## Sindefendo kontraŭ ŝtelistoj

el la rakontoj pri Afanti  
—laŭ ĉinesko Sopor-al-sudo\*

Afanti  
preter la palac’  
paŝis kaj vidis onin  
konstrui pene sen lac’  
laŭ la reĝa plaĉ’

muregon  
ĝian alten pli.  
“Kial ĝin plialtigi?”  
al vokto demandis li  
kun scivola kri’.

La vokto  
iom oldaĝa  
respondis en moka ton’,  
“Kian stultaĵon, saĝa  
vi vir’ kuraĝa,

diraĉas!  
Estas nia cel’  
sekurigi l’ palacon



kontraŭ la ŝtelistoj de l'  
fia malfidel',

kiuj ja  
volus trudi sin  
por rabi valoraĵojn.  
Tiel oni ja sen tim'  
vivas laŭ rutin'."

"Vi pravas,"  
Afanti sen ĝen'  
diris, "sed kion fari,  
se ili troviĝas en  
palaca teren'?"



\**Sopir-al-sudo* (ĉine: *Yijiangnan*): ĉina fiksfirma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo *xa,xa,a* (*x=senrima*).

## Monta diluvo

— laŭ ĉinesko Dekses-Silabo\*

El  
mont' kvazaŭ el la ĉiel'  
alsturmas  
mortiga kruel'.

Pluv'  
ŝajne disfluas el kuv'  
torente  
en monta diluv'.

Mont'  
disfalas de horizont'  
terure  
jen ĝis nia front'.

Ter'  
dronas en flua liber'  
ŝlimeca,  
glita en danĝer'

Vic'  
da terdomoj laŭ kapric'  
faladas  
plaŭde en vortic'.

Ar'  
da brutoj en la batal'  
baraktas  
por denova star'.

Muĝ'  
inunda pelas al fuĝ'  
la homojn  
en terura fuŝ'.

Kri'  
homa laŭtas en anksi'  
ulule  
ŝajne de mani'.

Jen  
la savbrigada alven'  
vidiĝas  
al kriza teren'.

Jes,  
kontraŭ inuda agres'  
luktadas  
ili ja sen ĉes'.



\**Dekses-Silabo*: ĉina fiksfirma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo *a,a,xa* (*x=senrima*)

## Ĥristina Kozlovskaja (Ukrainio)



### Fabelo pri Talpo

Iam vivis Talpo. Li laboregis peze, tiel peze, ke li eĉ ne havis tempon por ripozi. Li fosadis tunelojn subtere, ĉesis nek tage nek nokte, skrappenetris per siaj piedoj tra malmola tero tiom forte, ke sango eliĝis el ili, tiom forte, ke li foje tute eluzis la ungojn, sed li fosadis kaj fosadis. La Talpo movis sin antaŭen rapide, sed li volis ankoraŭ pli rapide, la tero premis lin de ĉiuj flankoj, rezistante al la korpo de la Talpo, forskrapadis lian silkecan felon, sed la Talpo ne atentis tion, lia felo mudis, sed poste la nova kreskis. La Talpo daŭrigis la fosadon. Pli kaj pli da tuneloj kuŝis



malantaŭ la Talpo, sed estis la sama netrairebla muro antaŭ li, kaj la Talpo estis tratabanta tiun muron, denove kaj denove estis tratabanta, por ke liaj tuneloj plimultiĝu, por ke ili iĝu pli longaj. La okuloj de la Talpo konis neniun alian koloron, krom la koloro de mallumo, la naztruoj de la Talpo konis neniun alian odoron, krom laodoro de humida grundo. La Talpo laboregis pene, ho tiel pene, ĉar li sciis, ke baldaŭ liaj infanoj naskiĝos en la mondon. Kaj kiam liaj tri filoj naskiĝis, la Talpo ĵetis sin en la pezan laboron ankoraŭ pli intense, ĉar li havis jam iujn, por kiuj li vivu, iujn, kiujn li prizorgu. La Talpo forgesis eĉ kiel trovi spiron, li fosis kiel spiris, ĉiutage, ĉiuminute. Kaj la Talpo faris siajn tunelojn ĉiam pli kaj pli larĝajn, por ke liaj filoj neniam

devu forskrapadi siajn felojn, kiel li estis farinta iam, por ke la tero ne premu ilin tiom senkompate en sia sino, kiel lin iam, li volis almenaŭ, ke ili, se al li ne estis destinite, sentu, kio estas spaco, kio estas libereco. Kaj jam la filoj kreskis, kaj ankaŭ ili eklaboris, kaj ili sekvis sian patron kaj helpis lin.

– Filoj miaj, infanoj miaj, – la maljuna Talpo diris, – mi laboris la tutan mian vivon pene, por ke vi vivu pli facile, rigardu malantaŭen, jen serpentumas centoj, miloj kilometroj da larĝaj, vastaj tuneloj, iru kaj loĝu tie, kaj daŭrigu nian genton.

– Ho ne, patro, – la infanoj kontraŭdiris, – ni ne volas viajn tunelojn, ankaŭ ni volas senti nin kiel posedantoj, ni volas fosi niajn proprajn tunelojn, nelonge restas por ni vivi sole, baldaŭ ankaŭ ni havos niajn proprajn familiojn, baldaŭ ankaŭ niaj infanoj naskiĝos en la mondon.

– Nu bone, – suspiris la Talpo, laca kaj elturmentita pro la laboro, sed kion li povis fari, – tiam almenaŭ per mia konsilo mi estos utila por vi, se vi ne volas miajn tunelojn.

Do la maljuna Talpo komencis doni konsilojn por siaj filoj kiel fosi pli rapide kaj en kiun direkton. Sed li mem ne evitas la laboron, skrappenetras per la dentoj en la teron per tutforte por tamen ankoraŭ helpi siajn filojn. La tero premas lin, ne lasas lin spiri kaj ŝtopas liajn naztruojn. Mi laboradis dum mia tuta vivo kiel sklavo, fosadis pli kaj pli larĝajn tunelojn, ĉar mi strebis al vasto, sed nun mi mortos sufokita de la grundo, – pensis la Talpo kaj subiĝis al la sorto, lia korpo moliĝis, akceptante humile la tutan pezon de la ĉirkaŭa tero sur sin. Sed estas amare morti tute sola, li volis almenaŭ vidi la infanojn antaŭ sia morto, la Talpo ekvigliĝis, streĉante siajn tutajn muskolojn, ekfosis furioze, ne domaĝante sian korpon, en la nigran teron. La lastaj restaĵoj de la fortoj forlasis la Talpon, sed la laboro bolis, li fosis tiel rapide, kiel neniam pli frue, kiel eĉ en sia juneco li ne

fosis, sed forgesis la Talpo en sia ardo la vojon, laŭ kiu li ĉiam moviĝis, kaj ekfosis iom pli alten. Kaj la Talpo faris la finan spurton kaj trabatis sin al la tersurfaco. La bonodora freŝa aero frapis liajn naztruojn, kaj tiel forte, ke li eĉ eksentis kapturniĝon. Kaj la Talpo ekvidis finfine surfacajn kolorojn, kies ekziston li eĉ neniam suspektis antaŭe, la Talpo rigardis la ĉielon, kaj larmoj fluis malsupren de liaj okuloj, ĉar lia menso apenaŭ povis kompreni la belecon de la ĉielo. Sed pleje la Talpo estis impresita de la spaco, la senfina, eterna spaco, al kiu li estis strebanta sian tutan vivon, por kies plivastigo li fordonis sian vivon. Ĉar li estis certa, ke la spaco ne estas donata tiel simple, ke por havi ĝin oni devas toleri dolorigan turmenton. Sed evidentiĝas, jen kie estas la spaco, evidentiĝas, ke li eĉ ne sciis, kio ĝi estas. Li tretis la sinon de la tero, boris ĝiajn internaĵojn dum sia tuta vivo, ne konante ripozon, sed ĝis la libereco restis nur kelkaj centimetroj. Sufiĉis levi sian kapon kaj fosi iom pli alten. Mi estas ĉi tie finfine, nun mi povas vivi kaj ĝui mian vivon. La Talpo rememoris siajn filojn, volis reveni al ili kaj rakonti ĉion. La Talpo venkis, li batalakiris finfine de sia vivo tion, kion li ĉiam volis, la Talpo ne kapitulacis plene, sed jam delonge kapitulacis la korpo de la Talpo. Li provis movi sin, sed lia korpo ne obeis. Li povis nur klini sian kapon malsupren kaj krii al la tera firmaĵo:

– Filoj miaj, iru ĉi tien, sekvu mian voĉon!  
Sed la filoj ne respondis kaj ne venis.

– Infanoj miaj, venu al mi, la tuta beleco de la mondo atendas vin – la Talpo ekkriis duafoje, ne rimarkinte, ke lia voĉo iĝis ankoraŭ pli mallauĉa kaj pli malforta.

Sed la filoj ankaŭ tiam ne venis, ĉar ili ne aŭdis sian patron.

– Filoj miaj, infanoj miaj, mi scias, ke vi ne plu aŭdos min, mi volas nur ke vi ĝis la fino iru laŭ mia lasta tunelo – la maljuna Talpo flustris kaj mortis, kvazaŭ li neniam

vivis.

Liaj filoj laboris dume. Sed post iu tempo ili subite rememoris:

– Sed kien nia patro malaperis? – ili demandis unu la alian.

Ili sidis kaj malĝojis por ioma tempo, esploris silente, sed ne serĉis lin, ĉar ili sciis, ke li jam ne estas en ĉi mondo. Kaj ili ekstaris, ĉar ili devis komenci labori, ili ne havis tempon por mediti pri la vivo kaj morto, tia estas la talpa vivo: batali por spaco kontraŭ la tero ĉiutage.

*Elukrainigis*



**Petro Palivoda**

**(Ukrainio)**

**M. Zoŝĉenko\***

*Katino kaj homoj*

Mi havas tre malbonan stovon. Tuta mia familio ĉiam malsaniĝas pro haladzo. Sed diabla loĝeja kompanio rifuzas fari riparon. Ili ŝparas monon. Por vica malversacio.

Antaŭnelonge ili pririgardis mian stovon. Ili rigardis riglilojn. Ili plonĝis internen per kapo.

– Ne estas problemoj, ili parolas. Vi povas loĝi.

– Kamaradoj, mi parolas, hontu elparoli tiajn vortojn: vi povas loĝi. Ni ĉiam malsaniĝas pro haladzo de nia stovo. Antaŭnelonge eĉ katino malsaniĝis pro haladzo. Ŝin naŭzis antaŭnelonge apud sitelo. Sed vi parolas: vi povas loĝi.

Prezidanto de loĝeja kompanio parolas:

– Bone, li parolas, nun ni okazigos eksperimenton kaj ekscios: ĉu via stovo haladzas aŭ ne. Se ni nun post hejtado malsaniĝos pro haladzo – estos via feliĉo – ni riparos. Se ni ne malsaniĝos pro haladzo, do ni

faros nenion.

Ni ekhejtis stovon. Ni lokiĝis ĉirkaŭ ĝi.

Ni sidas. Ni flaras.

Ĉi tie apud riglilo sidis prezidanto. Ĉi tie sidis sekretario Gribojedov. Ĉi tie sur mia lito sidis trezoristo.



ilustraĵo de Tatjana Ĥomjakova

Baldaŭ certe haladzo komencis disvastiĝi laŭ ĉambro.

Prezidanto ekflaris kaj parolas:

– Ne. Mi sentas nenion. Estas varma aero kaj nur.

Trezoristo, la bufo, parolas:

– Estas tute bonega atmosfero. Oni povas flari ĝin. Kapo pro tio ne malfortiĝas. En mia loĝejo, li parolas, atmosfero pli malbone fetoras, sed mi, li parolas, ne jelpas vane. Sed ĉi tie aero estas absolute laŭnorma.

Mi parolas:

– Kiel estas “laŭnorma”? Jen kiel gaso strie fluas.

Prezidanto parolas:

– Voku katinon. Se katino trankvile sidas, do problemo ne estas. Ŝi estas ne homo. Oni povas fidi al ŝi.

Katino venas. Ŝi sidas sur lito. Ŝi sidas trankvile. Tio estas komprene – ŝi nemulte alkutimiĝis.

– Ne, – prezidanto parolas, – nenio estas.

Subite trezoristo ekbalanciĝis sur lito kaj parolas:

– Mi devas urĝe foriri laŭ afero.

Li mem aliras al fenestro kaj spiras al fendeto.

Li mem iĝis verda kaj fakte balanciĝas sur gamboj.

Prezidanto parolas:

– Nun ni ĉiuj foriros.

Mi fortiris lin de fenestro.

– Vi ne devas tiel okazigi eksperimenton.

Li parolas:

– Bone. Mi povas deiri. Por mi via aero estas sufiĉe utila. Ĝi estas natura aero, taŭga aero por sano. Mi ne povas fari riparon al vi. La stovo estas normala.

Sed post duonhoro, kiam la prezidanton oni kuŝigis sur brankardon kaj poste enŝovis brankardon en aŭton de sukuro, mi ree kun li ekparolis:

– Nu kiel?

– Ne, li parolas, ne estos riparo. Vi povas loĝi.

Tiel ili ne riparos. Nu kion faras? Mi alkutimiĝas. Homo estas ne pulo – homo povas alkutimiĝi al ĉio.

*\*Miĥail Miĥajloviĉ Zoŝĉenko (1894 – 1958) estas fama sovetia verkisto-satiristo. La rakonton li verkis en 1927-a jaro.*

*Esperantigis*



**Igorj Ĥomjakov**

**(Rusio)**

Eldonas Redakcio de *Penseo*

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)

Adreso: No.-3-2 de la 5-a etaĝdomo de No. 19, St. Wujiang, Jiangbei-Distrikto, Chongqing, 400023, Ĉinio

Tel: (023) 67095890 (hejme)

Retadreso: [vejdo@163.com](mailto:vejdo@163.com)

Ĉiujn kontribuajojn al la ĉefredaktoro.

Por legi pasintajn numerojn de *Penseo*, vin turnu al [www.elferno.cn/penlisto.htm](http://www.elferno.cn/penlisto.htm)